# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo februaro 2020**


## ŜANĜO DE PREZIDANTO EN MEL

En la ordinara ĝenerala kunsido okazinta la pasintan 13an de januaro okazis ŝanĝo de prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo. Kvankam la deĵorperiodo de la nuna estraro ankoraŭ ne finiĝis, la prezidanto montris sian pretecon rezigni por okupiĝi pri aliaj taskoj. Kiel nova prezidanto estis elektita Félix Jiménez Lobo.

En la apudaj fotoj, vi povas vidi simbolan "ŝanĝon de teko" inter la antaŭa kaj nova prezidanto, kaj momento de la komuna laborado, kun ambaŭ prezidantoj kaj la sekretario en la mezo.





Dankon al Manolo pro lia ĝisnuna agado kaj bonvenon kaj bonŝancon al Félix!

## ALIAJ DECIDOJ EN LA ĜENERALA KUNVENO

Dum la ĝenerala kunveno de Liceo oni ekzamenis ankaŭ aliajn punktojn proponitajn en la kunvoko.

Oni studis la konsekvencojn de la ŝanĝo de karaktero de la banko kie MEL havas sian konton, kaj manierojn faciligi la operacion.

Krome, la estraro informis pri evoluo de la membraro, pri la financa raporto 2019, oni diskutis kaj aprobis la buĝeton por 2020. Oni konservis la kotizon por la asocio, kiu plu restas 12 eŭroj jare.

Estis diskutita kaj aprobita la agad-raporto 2019 kaj la propono por agad-programo por 2020, kaj ni diskutis eblajn agadojn por peti subvencioj por tiu ĉi jaro al la urbodomo.

Membroj de MEL ricevos la oficialan protokolon laŭ la kutima maniero.

## KULTURAJ VIZITOJ

Nuntempe, ĝis la 15a de februaro, oni montras en la "Instituto de Tecnologías Físicas y de la Información Leonardo Torres Quevedo" (ITEFI), esplorcentro apartenanta al CSIC, ekzpozicion pri tiu genia inventisto kaj inĝeniero, kiu, kiel oni scias, estis mem esperantisto. La sidejo troviĝas en la strato Serrano, 144, kaj la eniro estas senpaga.

Ni nun planas la eblecon organizi komunan viziton, eble la lundon 10an vespere aŭ la mardon 11an matene. Se vi estas interesita, skribu al la adreso de Liceo, ĉe: madrid@esperanto.es, por informi vin kiam la informoj konkretiĝos.

## VIZITOJ DE ESPERANTISTAJ AMIKOJ EN MADRIDO




Dum la monato januaro ni havis la ŝancon akcepti plurajn esperantistojn el aliaj lokoj de Hispanio aŭ el aliaj landoj.

Dum la festoj de Epifanio gastis ĉe esperantista amiko Elda Doerfler, esperantisto el Triesto. Kelkaj liceanoj rendevuis la 8an de januaro en trinkejo, kaj babilis pri diversaj temoj.

La 20an de januaro vizitis la sidejon Pablo Busto, nun loĝanta en Sevilo, respondeculo de diversaj projektoj en Esperanto, inter kiuj Babelo Filmoj (produktanto de filmoj kiel la furora "Dek bovinoj") kaj la retejo Tubaro, kie eblas spekti videojn nur en Esperanto aŭ pri la lingvo (https://tubaro.aperu.net/). Li interparolis pri tiuj projektoj kaj la evoluo de la videa arto en Esperanto. Ni poste bierumis kun li en la proksimeco de la sidejo.



La 22an de januaro venis en Madridon, el Ĉinio kaj survoje al Brazilo, Rafael Zerbetto, brazilano laboranta en la redaktejo de la reta portalo "El Popola Ĉinio". Li rendevuis kun madridaj samideanoj kaj vizitis la urbon.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ

La kantabraj amikoj anoncis ke jam pli ol 100 homoj aliĝis al la 79-a Hispana Esperanto-Kongreso, okazonta en Comillas (Kantabrio) de la 30a de aprilo ĝis 4a de majo 2020. En la retejo aperas la provizora programo, inklude de la proponita postkongresa ekskurso laŭ la marborda jakoba Vojo. Vizitu la retejon: http://www.esperanto.es/kongreso, por koni pliajn detalojn, inklude de la aliĝmaniero.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. La unuasabata renkontiĝo okazos la 1an de februaro, je la 6a horo vespere, en Medialab-Prado, kiel kutime lastatempe.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com